



La Brita Esperantisto

Julio-Aŭgusto 1985



Transporto kaj demetiĝo en maro

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

81/A Jaro, N-Ro 865

Julio-Aŭgusto

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn 'Esperanto News' kaj 'La Brita Esperantisto'. Abono nur al "La Brita Esperantisto" estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, 'intensive' kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

SHORT BUT NOT RISIBLE

As a teacher of English, I once had the arrogance, just before closing time, to try to explain the plot and themes and major characters and the linguistic glory of "Hamlet" to an indifferent, inebriated colleague. Since the landlord only allowed me ten minutes for my lecture, it was rather less full than I would have liked.

The effect on the colleague was more or less what you might expect in the circumstances, in that he was impressed by my enthusiasm for the subject and indicated vaguely that it was obviously the sort of thing that he really ought to look into one of these days.

When I watched "Bookmark" (BBC 2, 17 April 1985), I found my reactions to the item on Esperanto similar to those of my colleague. I was given a great deal of information, much of which was new to me, and which was passed on by enthusiastic and articulate exponents of Esperanto in television performances that were of uniformly high quality.

Reto Rossetti gave a brief and concise history of the birth and early years of the language, and outlined its main aims. (I was delighted to see that Zamenhof, too, had tackled "Hamlet"). Rossetti's comments stressed also the universality and unity of Esperanto today. This led naturally to a scene with a group of Esperanto speakers conversing socially with obvious and consummate ease (but to the uninitiated, total incomprehensibility). The single most surprising moment for me was the revelation that this was in an Esperanto pub, whose location – sadly – was not revealed. Inside, Daphne Lister and others showed just how alive Esperanto is in a perfect illustration of a living language in a natural and therefore really testing situation.

This, in turn, permitted a link with Bill Auld completing the picture by discussing the literature of the language, and his own epic, "La Infana Raso". This was an important moment, since this was

virtually the only work referred to which was originally written in Esperanto and therefore indicated a creativity and originality of literature in Esperanto which is every bit as essential to a language which is truly alive as any ability to cope with the casual social chatter of everyday life.

In passing, I would take issue with Bill Auld, who asserted that "everybody knows Burns". "The best laid plans of mice and men..." – every Scot, perhaps!

So, the item on Esperanto dealt most efficiently with the history, conversation and literature of Esperanto, and managed it far more effectively in a similar time than I did for just one play, never mind a whole language.

Two things reduced the effectiveness of this venture, and the first cannot by any means be laid at the door of the Esperanto contributors. 'Bookmark's' handling of this item does not bear close scrutiny, with its timewasting radio babble/Tower of Babel sequence, and the regrettable but inescapable impression given by what we saw and heard that all Esperanto speakers were middle-aged, at least, and all eloquent middle-class intellectuals. Hardly the basis for a language for peace and the masses! Worse still was presenter Ian Hamilton's introduction to the item. He spoke of the "shaky assumption" that international language helped international peace and understanding – neatly pulling the rug from under Reto Rossetti's feet, since this was a major point of his – and going on to suggest that a lack of Esperanto literary criticism implied a lack of anything to criticise, then mentioning that he only "supposed" there were Esperanto best-sellers, and finally saying that of the various "brave new lingos" (ouch!), Esperanto and its twelve million speakers was the "most enduring and the least risible". It seemed to mean that all international languages were hilarious and short-lived, but that the BBC had picked the longest-lived survivor which was also the most boring. Or, at best, the

least hilarious. It was not the most sympathetic of introductions, and you could practically hear his sigh of relief when he progressed to the altogether more solid ground of Dorothy Wordsworth in the next item.

My second criticism concerns something which the contributors could, perhaps, have done something about: the treatment of the language itself. For someone who is an Esperanto illiterate, I could occasionally identify, with the aid of the subtitles as they rolled past Hamlet's strangely disembodied head, the odd word or two, but by and large I was hopelessly lost. Nowhere in the item was it made clear what the language itself was, nor what it did, nor precisely how it did it. Just why was it the most enduring, least risible language of twelve million souls? How did it compare with, say, French or Cantonese? Perhaps this, too, is the fault of the BBC people, but I have my doubts. Surely those involved had some control over this fairly vital point?

I suppose it would be churlish of me to complain about the shortness of the item. After all, it is television's nature – and certainly a book review programme's nature – to 'dip into' rather than 'explore in depth'. Nevertheless, having read an English translation of "La Infana Raso", my heart bled for Bill Auld when he was obliged to reduce it to the point where he said that it was his view about everything, for all time and everywhere . . .

Finally, the item left me with a feeling that Esperanto seems to continue to suffer from having no geographical location from which to take its initial culture, customs and character. All those translations over the last decades, all the cosmopolitanism seemed to hint at the lowest common denominator of many cultures rather than the highest common multiple. I have a feeling that this may not be true in fact. I am certain that all those who appeared and spoke so fluently would certainly disagree with me, but the impression given was (with

the exception of "La Infana Raso") that any success or durability was borrowed – any culture somehow artificial and a little contrived – and that therefore Esperanto has still to find its true self.

Like my bemused colleague in the pub, I feel that I have been given – in the circumstances – an interesting but incomplete glimpse of something that I still do not really grasp, but that I really must look into it one of these days.

Jim McDonald
(19 April 1985)

LA 80a SKOTA KONGRESO

La 80a kongreso de la Skota Federacio okazis en Horselethill House, Glasgovo, de 12a ĝis 14a de aprilo 1985. La glasgova grupo meritas multajn gratulojn pro la bona organizado. Ĝi komenĉiĝis vendrede per muzikvespero, kiun gvidis Petro Harvey. Elstara inter la kantistoj estis lia nevo, nova esperantisto.

Sabaton, post studhorro por lernantoj kaj konsilantarkunveno, Albert Goodheir gvidis nin tra antikvaj kaj modernaj pejzaĝoj en prelego "En Grekujo kun dorsako" Dum la jarkunveno la prezidanto, Prof. Stanley Nisbet, admonis nin plifortigi la movadon en Skotlando. Ekskurso al la nova muzeo 'Burrell Collection' kondukis nin denove al pasintaj epokoj. Vespere ni ĝuis teatraĵojn de la edinburga grupo, muzikon kaj dancadon.

Dimanĉon David Bisset gvidis diservon. D-ro Werner Bormann, sekretario de la Akademio de Esperanto, parolis pri la Esperanto-movado en la Germana Federacia Respubliko. William Auld prelegis pri la skota kontribuo al la Esperanto-kulturo, kaj Stanley Nisbet gvidis diskuton pri la 'interna ideo'.

La sekvanta kongreso okazos en Newbattle Abbey apud Edinburgo, en aprilo 1986. Sed jam antaŭe ni esperas revidi unu la alian en Dunblane, kie okazos la skota aŭtuna semajnfino de 6a ĝis 8a de septembro 1985.

Margaret Mackay

UNUA KONGRESO EN KIMRUJO –
LLANDUDNO, 5 - 8 APRILO 1985

Ĉi tiu estis la 69-a Brita Kongreso de Esperanto, sed la unua en Kimrujo. La saluto de la Distriktestro de Aberconwy jam aperis en la kimra en "Esperanto News" montrante ke ni irintos al lando, kie homoj parolas pluan lingvon ol la anglan.

Mi atingis la Kongresejon preskaŭ je la kvina kaj duono, opiniante ke laŭ kutimo de antaŭaj kongresoj, ĝi komenciĝos je la sesa aŭ poste. Kolektinte la dokumentojn mi rigardis la kongreslibron kaj trovis ke Marjorie Boulton jam prelegis pri problemoj de Esperantaj aŭtoroj kaj ke tri aliaj eroj jam estis finiĝantaj: filmo pri Kimrujo, parolado pri la projekto Esperanto-Domo kaj prelego de John Wells pri "La Strukturo de la Kimra Lingvo". Mi ĉagreniĝis pro la maltrafo de eroj kiujn mi ŝatintus ĉeesti. Estis malgranda kompenso aŭskulti la lastajn minutojn de la prelego pri la kimra! Pluraj kongresanoj ankaŭ estis malkontentaj pri la fruaj komencoj ne anoncitaj! La kongresa programo, eĉ se nur provizora, devas esti presita en unu el niaj revuoj kaj nepre detaloj de eroj kiuj komenciĝos antaŭ la tradicia malfermo!

La inaŭguro estis far la Distriktestro de Aberconwy, lia Moŝto Konsilanto Gordon G. Williams. Li bonvenigis nin per la kimra. Aŭdante ne komprenatan lingvon mi sentis ke la Kongreso estis internacia! Vere ĝi estis pli internacia ol multaj antaŭaj. En Llandudno estis pola karavano kun 14 anoj; ankaŭ partoprenis francoj, germanoj, nederlandanoj, japanoj kaj unu dano. Dum la inaŭguro John Wells prezentis al la Distriktestro la unuan ekzempleron de la ĵus eldonita Esperanto-Kimra Vortaro.

En la Kongreslibro estis la salutoj al la Kongreso de la Princo de Kimrujo kaj la Ĉefministro de Britujo, Margaret Thatcher. Ĉu iu kongreso antaŭa ricevis salutojn de du egale gravaj homoj?

Je sabato la kunvenoj komenciĝis je la

9.15. Pli ol dudek eroj listiĝis en la programo. Neniu povis partopreni ĉiujn kompreneble! Ne eblas menciĝi la tuton de la eroj, sed mi kuraĝas speciale menciĝi la prelegon de akademiano D-ro Bormann pri "La Rolo de la Akademio" ĉar ĝi estis aparte interesa. Mi nun scias iom pri la laboro de tiu eminenta instanco. En la vespero ni estis akceptitaj de la Distriktestro de Aberconwy kaj S-ino Williams per balo kaj bufedo. La bando bone ludis kaj homoj dancis entuziasme. Mi taksas la vesperon kiel la plej bonan kiun mi spertis en britaj kongresoj. Bona kvanto da homoj restis ĝis la noktomezo kiam la muziko finiĝis.

Dum dimanĉo okazis la jarkunveno de B.E.A. kaj E.A.B. kie ni aŭdis de niaj gvidantoj tion, kion ili faris dum la jaro... aŭ ne faris, laŭ la komentoj de iuj anoj! La kunvenoj finiĝis akurate kaj tio permesis al la kongresanoj, kiuj partoprenis la oficialan lunĉon, piediri malrapide kontraŭ la vento, laŭlonge de la maro, ĝis la Imperial Hotel, kie atendis por ni la Urbestro kaj Urbeŝtrino de Llandudno. La afabla Distriktestro de Aberconwy kaj la edzino estis gastoj en la lunĉo. Post la manĝo, salutvortojn kaj dankesprimojn far la Urbestro, Distriktestro kaj prezidanto de E.A.B. Mario Austin. Tiam, denove ni piediras al la preĝejo Sta. Johano por la Diservo, kiu estis malfermita de la titola pastro. Multaj kutimaj membroj de la preĝejo troviĝis en la kongregacio tiel spertante Diservon en Esperanto.

La koncerto de tiu vespero far la Vir-ovoĉa Ĥoro Llanddulas kantanta kanzonojn en la kimra kaj Esperanta estis vere brila. La L.K.K. vendis enirbiletojn al la publiko, kaj laŭ anonco farita, 50 homoj aĉetis ilin. Mi aplaudas tiun miksadon de adeptoj kaj estontebaj adeptoj de la Lingvo, kiu okazis en la Diservo kaj koncerto, ĉar estas pli bone vidi la uzon de Esperanto ol aŭdi laŭdajn vortojn pri ĝi.

La pluvo kaj la malvarma vento kiu akompanis nian restadon en Llandudno ne ĉesis por la ekskursoj. Laŭ jam tradicia fato, la tuttaga ekskurso malfruiĝis pro paneo de aŭtobuso aŭ simila kaŭzo kaj tio malfruiĝis la komencon de la Distra Vespero, kiu okazis en la Teatro Arcadia, apud la Kongresejo. Ĉi tiu ne estis ordinara distro aranĝita je la lasta momento laŭ la kapabloj de la kongresanoj. Du junulinoj, kies kimrajn nomojn mi ne trafis, kaj ne estis presitaj en la Kongres-libroj, tre bone ludis lirojn kaj kantis naciajn kantojn. Katerino Missen, Manjo Austin kaj Lou Brooks prezentis kvar fragmentojn de Shakespeare: du el "Makbeto", unu el "La Megero" kaj unu el "Otelo". Tiu el "La Megero" far Missen kaj Brooks estis tiel bone prezentita ke mi ricevis la impreson ke la argumentoj kaj disputoj surscene estas parto de ilia ĉiutaga vivo. La kostumoj estis tradiciaj kaj ne improvizitaj! Mi bedaŭris ke Katerino Missen ne parolis pli laŭte, la flustrajoj de Damo Makbeto estis preskaŭ ne aŭdeblaj. Tamen, jen kerno de estonta teatra trupo! La Londona Esperanto-Horo regalis nin per bela kantado, inkluzive de tango solkantita de Lou Brooks. Kiel talenta viro li estas! Don Lord lerte prezentis la erojn kaj ankaŭ amuzis nin per unu el liaj neforgeseblaj monologoj. Je la fino la flago estis transdonita al reprezentanto de la L.K.K. por '86, en Loughborough!

Indas menciĝi la bonan grandan salonon en la Kongresejo kie oni povis manĝi, trinki, drinki, sidĉi kaj babili en komforto kaj pro tio oni ne devis fronti la malbonan veteron tre ofte. Ankaŭ la evidentiĝo de la kimra kulturo per kantado, muziko kaj uzo de la lingvo plaĉis al mi. Eble mi havas guton de sango de kimra praavo ne konata, ĉar mi entuziasmiĝis pri la lingvo kaj la nacieco. Kiel komenco de tiu entuziasmo mi aĉetis la novan Vortaron Esperantan-Kimran, kaj ĉi kimrigis la nomon!

Siân M. Lleuad.

LA FINA VENKO?

People are so rude about the EEC that it's good to report a genuinely wise and prudent decision. From 1987, the Commission is to begin using – for translation – Esperanto, the much-derided international language.

It's a smart idea. At the moment, the EEC has to have squads of people who speak, for instance, both perfect Danish and perfect Greek so they can translate one from the other. With the Spanish and Portuguese joining soon, there will be no fewer than 36 language pairs in the organisation.

As soon as the interpreters have learned Esperanto (it's not all that hard; it's a sort of blend of English, French and Latin, with the syllable "jo" shoved at the end of most words) there will be only nine language pairs. So a Portuguese document on sardine-gutting regulations can be translated into Esperanto, and then directly into the other eight languages.

It's the first good news for Esperanto I can recall for a long time. Up to now there has been a faintly desperate note in their announcements, thus: "The Welsh Tourist Board produces leaflets for Esperanto-speaking tourists, and countries as varied as Hungary, Switzerland, Brazil and Belgium have issued commemorative postage stamps in its favour . . ."

It's also good news for the rest of us. Last year translation and interpretation cost a staggering 55 per cent of the European Parliament's budget. Speeches in the chamber cost a stupendous £10 a word.

– **Simon Hoggart in "Punch"**

La Redaktoro de la BE donos premion al tiu leganto, kiu ensendos la plej longan liston de vortoj uzitaj en tiu ĉi numero, kiuj finiĝas per -jo . . .

ESPERANTO ĈE UNO

Jen ĉisube elĉerpaĵo el informletero pri la laboro por Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

“Lastatempe grupo da gejunuloj ligitaj al Unuiĝintaj Nacioj proponis starigon de tutmonda komputila reto, kiu ebligas interkomunikigon kaj interhelpon inter la landoj de la Tria Mondo kaj la industriigitaj landoj. Terminaloj en la diversaj landoj estos ligitaj al tiu reto, kiu estos unuavice je la dispono de la junularo. La projekto nomiĝas *Young Unispace* (Juna Unispaco). Jam ĝi ricevis la oficialan subtenon de UNDP, la Evoluiga Programo de UN.

Se tiu projekto realiĝos, ĝi revoluciigos la rilatojn inter la junularo en la diversaj landoj. Ĝi tion faros ne nur pro la interŝanĝo de informoj, kiu rezultos el la projekto, se ankaŭ pro la lingvo, kiun ĝi uzos. Ĝi uzos Esperanton.

Ĝi uzos Esperanton ĉar la reprezentanto de UEA en la Komitato pri la Junulara Jaro, kiu laboras en la sino de UN en Novjorko, prezentis kaj akceptigis Esperanton en la preparlaboro por la projekto.

Kaj tio okazis siavice ĉar UEA gvidas kunordigitan agadon por Esperanto en Novjorko ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

La reprezentantoj de UEA estas regulaj partoprenantoj kaj konataj personoj en la laboro de UN kaj la neregistartaj organizoj ligitaj al ĝi. Ĉiujare ili ĉeestas dekojn, eĉ centojn, da kunsidoj, kunvenoj kaj renkontiĝoj. Ili pledas konstante por serioza pritrakto de la lingva problemo en Unuiĝintaj Nacioj kaj por utiligo de Esperanto.

Ili estas anoj de la Laborgrupo pri Esperanto, kiu uzas la oficejon de UEA en Novjorko kiel sian bazon. Tiu oficejo estas gravega elemento en la eksteraj rilatoj de nia Asocio kaj en la prezentado de Esperanto al la ekstera publiko. Interalie ĝi ebligas al ni kapti bonajn okazojn kiam ili prezentiĝas, influu la pensadon kaj agadon de funkciuloj de UN, kaj interveni ĉe la misioj de la

ŝtatoj-membroj”.

La oficejo de UEA en Novjorko petas financan subvencion pri la laboro – oni sendu kontribuojn al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ pagu per la landa peranto, t.e. B.E.A., Esperanto-Centro, 140, Holland Park Ave., London W11 4UF.

ESPERANTO KAJ RADIO

“Alskribu nin, ni petas, tiom ofte kiom estas al vi ebla, ĉar alskriboj el via lando estas, je nia granda bedaŭro, malofataĵoj”.

Tiu petego estas sur poŝtkarto, kiun mi ricevis de Radio Vieno, responde al unu el miaj fojaj poŝtkartoj al la Esperanto-Fako de ORF, A-1136, Wien, Aŭstrujo.

Aŭskultante al la ‘leterkestoj’ de kelkaj radio-stacioj kiuj daŭre elsendas programojn en Esperanto, mi miras kaj hontas, ke oni *tre malofte* aŭdas pri leteroj aŭ poŝtkartoj el Britujo! Kial? La regula escepto estas Bruno Najbaro en Keighley, Yorks. kies nomo ofte aŭdiĝas.

Oni tenas la fluecon en iu ajn lingvo per konstanta uzo kaj aŭskultado. Multaj Esperantistoj povas tre malofte uzi Esperanton, sed ĉiu havas la eblecon konstante *aŭdi* ĝin pere de radio, kaj tio multe helpas al bona kompreno kaj flua parolo. Eĉ se oni ne tuj povas kapti kaj kompreni, persistu ĝis vi povos!

Per ordinara, sed bona aparato, kun mezaj kaj mallongaj ondoj, oni povas kapti la plej multajn el 56 elsendoj ĉiusemajne nuntempe. Mi aŭskultas ĉiutage al kelkaj kaj mi rekomendas al ĉiuj fari same. Eĉ survoje hejmen de la Londona Esperanto-Klubo, en mia aŭto, per tre modesta aŭto-radio, mi povas aŭskulti al Radio Polonia per ondo 200m., 10.30-10.55 ptm.

Kiel vi vidas, ili estas tro multnombraj por detaliĝi ilin en ĉi tiu alvoko. Detaloj regule aperas en ‘Monato’, ‘Heroldo’, kaj en la UEA-revuo ‘Esperanto’ kaj se iu volas ricevi kopion, skribu al la oficejo kun afrankita koverto kaj ni sendos al vi.

LAŬ MIA OPINIO . . .

69a Brita Kongreso

Kia sukcesa bone aranĝita ĝuebla konferenco! Sendube aliuloj raportos pri la diversaj aferoj, sed kiel individua ĉeestinto mi volas fari omaĝon al la geanoj de la LKK, kiuj tiel ege laboris por la sukceso de la semajnfino, por la komforto kaj la kontenteco de la ĉeestantoj, kaj kiuj donis al la tuta afero tielan amikan, bonvenan etoson. Dankojn kaj gratulojn.

Frances Randall

It's not fair!

Simpatia estas la peto de Karolino Gilmore trovi tradukon de "fair", ŝi tamen ne starigas ĝuste la demandon. Unue, temas ne pri "fair", sed pri la esprimo "It's not fair!", ĉar oni ja ne krias pozitive "It's fair!" sed nur plende kaj negative kiam temas pri nejusta diskrimino. Due: ĉu fakte ŝi mem, kiel ŝi diras, bezonas tiun parolturnon? Eble ŝi verkas novelon kaj volas tion diri? Ĝis nun nur germanaj infanoj bezonis la esprimon kaj ilia nacia lingvo ne liveris taŭgan ekvivalenton.

Ĉu la esperanta literaturo iam tuŝis tiun bezonon? Eble en *La knaboj de Paŭlo-strato*? Mi ne memoras. Sed ekzistas pli frua ekzemplo, ne en traduko, sed en nia originala literaturo. Kiam en *Prozo ridetanta* (1928) de Raymond Schwartz mi legis rakonton kun titolo "Nelojale!" mi tuj konstatis el la teksto, ke temas pri ĝuste tia protesto "It's not fair!" kaj mi ĝin notis en la kapo por eventuala bezono, sed tiu bezono ne venis, mi do restis trankvila.

Nun mi ekrigardis en franca vortaro kaj konstatis, ke la franca vorto "loyal", kiel la angla vorto "fair" havas plurajn senceojn kaj unu el ili estas fakte tradukita per "fair". Ĉu eble iu franco skribis al sialanda organo pri la malfacilo diri "loyal" en Esperanto . . . ĉar tiu ankaŭ, simile al s-ino Gilmore, ne renkontis la uzon de Raymond Schwartz?

Sed entute mi ne respondas la demandon de la samideanino ĉar mi ne estas konvinkita, ke ŝi mem fakte kaj nun bezonas tiun esprimon. Do anstataŭ prognozi konjektajn bezonojn, ŝi restu ĉe la bezonoj realaj. Problemojn oni solvu nur kiam ili konkrete aperas. Tio sufiĉas. Kaj kion diras germanaj infanoj estas alia afero.

R. Rossetti

Instruado de Infanoj

Mi supozas, ke multaj gepatroj frontas problemon rilate al la instruado de Esperanto al iliaj gefiloj.

Mi komencis per diligenta legado en Esperanto ĉiunokte al mia filino antaŭ sia enlitiĝo. Kiam ŝi eklernis legi en la lernejo, ŝi notis ke iuj libroj estas skribitaj en Esperanto, kaj ke aliaj estas skribitaj en la Angla! Ja multaj el niaj infan-libroj estas en la Angla, kaj tiujn ŝi insistis, ke mi *legu* en la Angla. Ŝi rajtis mem elekti la libron legotan; kiel do organizi ĉiu tagan Esperanton (ŝi ne volis ke mi parolu en Esperanto kun ŝi)?

Ni faris interkonsenton, ke *ŝi* legu unue al mi en Esperanto (kaj respondu eventuala/jn demando/jn) kaj ke *mi* poste legu libron laŭ ŝia deziro.



Pro enhavo mi elektis 'Esperanto por Infanoj' -n de Solomon. Tiutempe ŝiaj Anglaj legolibroj havis proksimume 5 grandajn vortojn sur ĉiu paĝo. Kiom malfacile estis la Esperanto libro do! Preskaŭ ĉiutage (krom dum ferioj ŝi legis unu frazon el la libro. Je la fino, ŝi jam legis tutan alineon ĉiufoje.

Du jarojn poste, ĵus fininta la libron kaj nun sepjara, ŝi memfide legas en Esperanto. Ankaŭ ŝia scio ne plu estas pasiva*, kaj ŝi jam antaŭĝojas la infankongreseton en Germanujo. Kiu ŝi estas? Arleta Bauzá Phillips.

*renkontiĝoj kun ne-Angloparolantaj E-istoj pruvis tion.

Sally Phillips

Long House Hotel

Se necesas al vi bruaj, grandurbaj distraĵoj, ne legu plu. Mi skribas pri hotelo kun ŝildo ekstere "ESPERANTO PAROLATA", en alloga ŝtonkonstruita vilaĝo en la montetaro de Somerset.

Jam tri fojojn mi vizitis ĝin; allogas la majstra kuirado kaj la tre komfortaj, bele farbitaj ĉambroj. Mallonge for troviĝas Wells, Glastonbury, Wookey Hole kaj Cheddar. Tamen, nur du aŭtobusoj semajne trairas la vilaĝon, pro kio nepras veni per propra veturilo.

Unu el la du estroj de LONG HOUSE estas Paul Foss, kiu eklernis Esperanton nur en 1982 pere de la senpaga perpoŝta kurso. En apuda vilaĝo li ekkonatiĝis kun Esperantistino kun kiu li havis foje okazon praktiki – precipe vintre, kiam la hotelo ne havis tro da gastoj. Hazarde la korektanto de la lecionoj estis mi; tial mi rimarkis lian nomon kiam li aliĝis al EAB. Nun li tre lerte parolas Esperanton, aliĝis ne nur al EAB sed ankaŭ al UEA, havas korespondamikojn en pluraj landoj.

Estas en la hotelo loko por dek-kvar personoj. Eblus "ekster la sezono" – inter novembro kaj mezo de marto – aranĝi grupviziton uzantan la tutan hotelon por semajnfino, kaj Paul pretus oferti rabatitan prezon por tia. Mia dua el miaj tri restadoj en Long House estis en tia grupa aranĝo (tamen ne en Esperantista). Mi certas ke, per vizito, vi pruvas al vi mem ke mia priskribo, kvankam ĝi ŝajnas kvazaŭ reklamo, vere ne troigas.

Peter A. Danning

Long House Hotel, Pilton,

Shepton Mallet, Somerset, BA4 4BP.
Telefono: 074 989 (Pilton) 283.

Paŝoj al plena kompreno

En la ĝardeno, sola, esplorante, tempopasante ĝis la pli grandaj revenu el la vilaĝa lernojo, mi grimpas refoje sur la altamason da cindroj malantaŭ la domo por denove kaj de pli proksime primediti la ruĝiĝantajn "Reĝina Viktoria" prunojn sur la bela arbo kun la troŝarĝitaj branĉoj. Malsaĝa eta vento suŝprizas min, ekblovante kruelajn cindropecojn en miajn okulojn, samtempe malĝentile eklevante mian ĵupeton kaj malkovrante mian kalsonon kaj la dikajn femurojn de ekpaŝantino. Kiu estas tiu preskaŭ viva estaĵo nevidebla, kiu kviete parolas kaj kantas, kiu interrompas la senzorgajn okupadojn de etulinoj, kaj blovas sur la postajojn? Indigne mi kuras, serĉante patrinon, vokante al ŝi malviete.

Alian tagon, ni butikumas en alia vilaĝo, patrino kaj mi. La pli grandaj estas en la lernejo, kiel kutime. Piede ni hejmenrevenas. Patrino portas plenan korbon kaj kondukas min per la alia mano. Vintra vento sin levas kontraŭ nin kaj subite mia patrino ektenegas sian grandan peltveluran ĉapelon, forlasinte mian manon. La vento volas nin disigi kaj puŝas min malantaŭen. Mi ekkrias al panjo, sed la vento eniras min buŝe kaj volas krevigi miajn pulmojn. Senhelpa, senvoĉa, mi teruriga. Pacience mia patrino sin turnas. "Venu, venu," ŝi krias, "kliniĝu kiel faras mi". Tiel mi lernas barakti kontraŭ tiun kolosan malamikan siblantantan beston – la ventegon. Triumfe mi sukcesas atingi panjon. Mi levas la vizaĝon kaj ridas kun ŝi, sed la kruela besto denove eniras kaj klopodas krevigi miajn pulmojn. Ĉi-foje mia patrino vidas mian terurigon. "Fermu la buŝon!" ŝi kriegas.

Do, kliniĝu, ne timu, baraktu, persistu, kaj fermu la buŝon! Mi lernos!

Karolino Gilmore

ENKETO ĈE LA JUNULARO

Esplorgrupo pri socia psikologio dezirus ekscii, kiel hodiaŭaj junuloj (ĉirkaŭ 16-30 jaraĵ) de la mondo prezentas al si sian socion, kiel ili vidas la sociajn rilatojn.

Kompreneble ni pensas pri la esperanta movado, ĉar la esperantista junularo estas tutmonda; do ni povas atendi tre diversajn respondojn.

Samtempe la esperantistoj estas eble specifaj. Ĉu la respondantoj sentas ian specifecon?

En ĉiu medio kelkaj individuoj estas rimarkataj, distingataj. (Oni admiras iufoje, aliafoje oni timas, envias, kompatas aŭ malestimas aliulojn . . .)

Iuj distingas individuojn ĉie samamaniere. Aliaj observas malsame, depende de tio, ĉu ili estas en sia laborloko, en sia familio, sportante aŭ babilante kun amikoj.

- 1) Kiajn individuojn oni rimarkas?
- 2) Kio en tiu-ĉi rimarko dependas de la medio?
- 3) Ĉu (kaj se jes, kiel) la epoko influas la reagon de la homoj?
- 4) Ĉu la junuloj sekvas la maljunulojn aŭ kondukas alie?
- 5) Kio okazas al tiuj, kiuj ŝajnas diferencaj?
- 6) Ĉu ekzistas "esperantistaj" agmanieroj, aŭ ĉu la esperantistoj reagis, kiel aliaj anoj de la medio?

Ni ŝatus ricevi informon pri

* sekso,

* aĝo,

* profesio kaj

* loĝlando

de la respondantoj.

Bonvolu sciigi ankaŭ,

* kiamaniere vi eksciis pri nia enketo.

Ni certigas diskretan uzon de la respondoj, kaj publikigos la rezultojn de tiu-ĉi enketo tie, kie vi legas nian demandaron. Ni esperas, ke viaj respondoj kondukos nin al pli precizaj demandoj.

Antaŭe dankon.

Bonvolu sendi viajn respondojn al
ACRE
292, Bd des Bressons
F-13300 Salon de Provence
(Francio)

KONCIZE

Rezulte de letero de Lou Brooks en TV Times, kaj de la TV-programo "Bookmark", nia oficejo ricevis pli ol 600 petojn por La Unua Leciono.

* * *

ESPERANTO RESIDENTIAL CENTRE

La jarkunveno de akciuloj okazos sabaton la 26an de oktobro 1985 je 1.30 p.m. ĉe la Esperanto-domo Belper (50 Holbrook Road), Derbyshire. Informon petu de Mary Davies, 69 Twemlow Parade, Morecambe LA3 2AL.

* * *

La Brita-Bulgara Amikecocieto (British-Bulgarian Friendship Society) intencas starigi Esperanto-fakon.

Esperantistoj, eĉ ne-anoj de la Societo, kiuj interesiĝas partopreni, bonvolu havebligi siajn adresojn, nomojn kaj telefonnumerojn al:

John A. Spencer
30 Adolphus Road
London N4 2AY
Tel: 01-800-0454

* * *

AŬDO-VIDA KURSO DE ESPERANTO por progresintoj estas instrumaterialo, taŭga por daŭrigaj kursoj, someraj kursejoj, amuza instruado en kluboj aŭ por memlernado. Ĝi konsistas el sterea kasedo C90, koloraj diapozitivaj, dek tekstlibretoj por la lernantoj kaj instrukcio por la kursgvidanto. Kontraŭ 100 DM aŭ egalvaloro/pago interkonsentota/ĝi estas mendebla ĉe la aŭtoro: Stano Marček, Zvolenská 15, CS-03601 Martin, Ĉeĥoslovakio.

* * *

The German ambassador was asked to

open the first conference on German of Britain's Centre for Information on Language Teaching and Research (CILT) 10 years ago. He said – in perfect English – “When we sell you our goods, we are very happy to use English. But if you want to sell to us in a buyer's market, you had better do it in German!” – *John Trim, in “Good Housekeeping”*.

* * *

Inter la 16-a kaj 25-a de aŭgusto 1985 okazos naturamika tendaro en Hungario. Kunvenos c.30-40 personoj, ĉefe esperantistoj, sed ankaŭ krokodiloj, kiel reprezentantoj de diversaj naturprotektadaj movadoj en Europo. La partoprenantoj estos ĉefe junuloj, sed rajtas veni ĉiu, kiu volas, kaj kiu volonte pasigos tiom da tempo en tiaspeca samema rondo, kaj bezonas ne pli da komforto ol tendo kaj dormosako.

La tendaro okazos en bela arbara regiono, la laborlingvoj estos E-o kaj la angla. La programo estas i.a. naturobservado, fakprelegoj, laborgrupoj, preparolado de kunlaboreblecoj inter naturprotektadaj movadoj, k.s.

Pli ĝustajn informojn kaj aliĝilon Vi povas ricevi de la organizanto: BAROSS Rezsó, H-1136 Budapest, Balzac u. 11.

* * *

E-rondeto “AMIKECO” el Česká Třebová (Ĉeĥoslovakio) aranĝos al komenco de Septembro 1985 letervesperon okaze de 25-jara datreveno de sia fondiĝo.

Ĉiuj salutsendaĵoj el tuta mondo estos respondataj per bela broŝuro pri nia urbo. Unu letero estos ellotumita kaj al sendanto ni garantios 7 tagan senpagan restadon en nia urbo. Skribu al: Cilka Kotyzová, Drobného 1112, CS-560 02-Česká Třebová, ĈSSR.

* * *

Majo estas la plej bela monato en Svedio. Tial svedaj esperanto-asocioj tiam aranĝos Kultureman Esperanto-Festivalon. Dum tri tagoj, 16-19 de Majo 1986 okazos la festivalo en la mal-

nova studenta urbo Uppsala. Por tiu evento estas bezonataj kulturemaj homoj.

Se vi verkas kaj/aŭ povas prezenti teatraĵojn, kabaredojn, muzikaĵojn, kanzonojn ktp Esperante, informu nin pri vi!

Se vin interesas kaj ĝojigas Esperantokulturo, notu: KEF, 16-19 Majo, 1986, Uppsala, Svedio.

Venu al la Festivalo kiam la printempo vekiga!

* * *

Taskenta Buroo de turismaj vojaĝoj kaj ekskursoj preparis novan ekskurson tra la urbo en Esperanto. Unuafoje tiu ĉi ekskurso estis gvidata por la partoprenantoj de UzER-9 (Uzbekia Esp. Renkontiĝo) la 15-an de dec. 84. La ekskurson gvidis la profesia ĉiĉefono de la Buroo, aktiva anino de la Taŝkenta E-klubo juna s-ino Nina Aleksandrova.

Dank'al la precedenco ekde nun eksterlandaj turistoj, vizitantaj taskenton en la konsisto de sindikataj ekskursgrupoj kaj delegitaroj rajtas mendi ekskursojn ne nur en la angla, germana, franca, rusa k.a. lingvoj, sed ankaŭ en Esperanto.

Petu informojn de Esp. klubo, ab/kesto 140, Poŝtamt, SU-700000, Taskento, Uzbekio, USSR.

* * *

“Ovo” estas la nomo de nova revuo por distro kaj amuzo, kiu kuraĝe startis en Zagrebo, Malgraŭ diversaj krizoj, kiuj regas ĉirkaŭ ni, “Ovo” ne perdas optimismon. Oni planas eldoni 15 numerojn en 1985. Helpu kunkovi, ebligu maturiĝon de la embrio... Ankaŭ ĝi riĉigu Esperanton sojle de ĝia centjara jubileo.

(Prezo por 15 numeroj: 10 us. dolarojn).

Ĉiuj redakcioj estas petataj sendi interŝange siajn publikaĵojn al la “Ovo” – eldonisto Kroatia Esperanto – Ligo Amruŝeva 5, Yu 41000 Zagreb.

* * *

En Zagreb (Jugoslavio) okazos ankaŭ ĉi-jare Pupteatra Internacia Festivalo – PIF. Tiu granda teatra aranĝo, kiu jam 18 jarojn uzas Esperanton, okazos inter 24.08. kaj 01.09.1985. En Esperanto prezentos profesiaj teatroj el Belgio, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Islando, Japanio kaj Kanado, sed ankaŭ el Svedio, Pollando, Sovetunio kaj Jugoslavio.

Eble nenie en la mondo vi povas ĝuitian Esperanton kaj tiom da ĝi kiel en Zagrebo.

Vizitantoj al la nekutima renkontiĝejo de Esperanto, teatro kaj pupoj estas bonvenaj.

(Aliĝkotizo: 8 usonajn dolarojn aŭ ekvivalente. Por aliĝintoj ĝis la 31.05.85 eblas rezervi hotel ĉambrojn je 5 us. dolaroj ponokte. Organizanto: Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5, Yu 41000 Zagreb, Jugoslavio).

* * *

Post sukseza vizito al Hispanujo, Frank Buckley ĵus vizitis Francujon por prezenti sian prelegon “Kvindek Jarojn de Esperanto”.

Dum 24 tagojn li vizitis 22 esperantajn grupojn en 20 urboj kaj prezentis la sonbendan/lumbildan programon 30 fojojn.

La ce-estantaroj variis de 4 entuziasmuloj en monta vilaĝo al pli ol 800 en franca lernejo. Li ofte prelegis al ne-esperantaj grupoj kun franca traduko.

Frank estos en Aŭstrio dum majo Skandinavio dum Septembro kaj Nederlando dum Oktobro. La Septembra vizito, je la invito de la prelegvojaĝa servo de la Dana Esperanto-Asocio, enmetos la klubojn de Arhus, Kopenhago, Fredericia kaj Odense, kun konferenco en Naestved kaj kun vizitoj al grupoj en Norvegio kaj Svedio.

Frank ĉe-estos kunvenojn kaj konferencojn dum la somero kaj sekretarioj povas kontakti lin je 620 Filton Avenue, Bristol.

NOVAJ LIBROJ

Faktoj kaj fantazioj. Progresiga legolibro, de Marjorie Boulton. UEA, Rotterdam, 1984. 430p.

“Admiro” estas anagramo de “mirado”, kaj inverse, du vortoj, kiuj taŭge esprimas la reagon al tiu ĉi kalejdoskopka libro, eĉ pli taŭge ĉar en ĉapitro 30 Boulton pritraktas anagramojn kaj aliajn specojn de “Vortaj Sportoj”, kiel titoliĝas tiu ĉapitro, kies tenton mi ne povis rezisti, do devis paŭzi por solvi ĉiujn enigmojn, inkluzive de la krucvorta. Tamen tiu, kiu ne interesiĝas pri enigmoj, trovos multon alian – ĉu distran, ĉu informan – nepre interesan.

Ĉar la libro estas precipe por progresantoj, verŝajne estas konsilinde priskribi iom pli detale ol kutime la enhavon, por ke celata legonto povu taksu ĝian valoron, kaj eventuale aĉeti ĝin. Cetere, se en iuj okazoj la prezo estas tro alta por individuo, eble progresiga kurso aŭ grupo povus kune aĉeti ĝin, kaj profiti de sugestoj pri ludoj, ekzercoj kaj aliaj rimedoj praktiki la lingvon.

Iuj ĉapitroj estas rekte priesperantaj: En ĉapitroj 8 kaj 10 (Unuaj plumamikoj 1 kaj 2) la leganto ricevas konsilojn pri kiel starigi kaj daŭrigi (aŭ ĉesigi) korespondadon. Ĉapitro 49 pritraktas la vivon kaj laboron de Zamenhof; en ĉapitro 5, “Kiel utila Esperanto jam estas”, Boulton informas pri ĝisnunaj atingoj de la Movado, kaj finas per vortoj, kiujn devus legi ĉiu intervjuisto: “Do ne demandu al serioza esperantisto . . . ‘Ĉu vi kredas, ke Esperanto iam sukcesos?’ Tiu spertulo deziras, ke Esperanto sukcesu multe pli grandskale; sed li aŭ ŝi jam scias per sperto, ke Esperanto sukcesas”. Troviĝas ankaŭ ĉapitroj pri esperanta stilo, esperantaj proverboj, k.c. Aliaj ĉapitroj pritraktas ĝeneralajn temojn: Fantaziajn, inkluzive de fabeloj el la tuta mondo, ĉiu enkondukita per priskribo de la koncerna lando aŭ popolo; kaj Faktajn, inkluzive de bestoj, testamentoj, parolantaj birdoj, atingoj

en alta aĝo – troviĝas temoj tiom multaj kaj diversaj, ke oni povas nur miri pri la kvarjara, pacienca esplorado.

Inter la ĉapitroj estas aspergitaj anekdotoj, spritajtoj, kuriozaĵoj, novaj proverboj kaj “versaretoj”, kiuj ilustras diversajn gramatikajn punktojn . . . tamen ne eblas priskribi la tuton, ĉar la libro havas pli ol 400 paĝojn, kun vasta gamo, kiu etendiĝas de “Muziko” ĝis “Monstroj” (realaj kaj fantaziaj). Mi serĉis mankojn, sed trovis nur etan: Inter la heroaj suferintoj de nia Movado ne aperas la nomo John Cresswell.

La stilo kaj lingvaĵo estas modele klaraj kaj simplaj, la tono estas edifa, erudicia kaj sprita, – alivorte la libro estas tipe Boul-tona.

Dafne Lister

Ĉu vi konas la teron? Ĉapitroj el la Geologiaj Sciencoj, de Endre Dudich. Scienca Eldona Centro de UEA. 150p + 68p de anoncoj.

Jen la unua vere scienca libro eldonita de S.E.C. Oni diris en la jarraporto de UEA, “Ni sur tiu ĉi kampo (de scienca eldonado) troviĝas proksimume tie, kie la esperanta beletro estis en la unua jardeko de ĉi tiu jarcento”.

Kompreneble, ke S.E.C. havis multajn malfacilaĵojn dum sia trijara vivo, oni devas gratuli la laborantojn pri tiu unua libro.

Dudich verkis popularan sciencan prezentadon de la ĉeftemoj de Geologio. Ĝi komenciĝas per diskuto pri la kemiaj kaj mineralaj aspektoj, kaj progresas tra montkonstruado, erozio, fosilioj, tektoniko, al la nuntempa ekspluatado de la teraj riĉoj. La fina ĉapitro rigardas la estontecon de la fako kaj la eblecon de eltera trarigardo kaj komparo kun aliaj sunsistemaj planedoj.

Ĉio estas legebla kaj leginda por tiuj, kiuj interesas pri la mondo, sur kiu ni troviĝas. Ofte novlerninto demandas sin, kiel liŝi progresas en la lingvo, kaj por tiu, kiu ne interesas pri literaturo, tiu ĉi libro povas esti bona paŝo.

Tamen la lingvaĵo ne estas kaj ne povas esti ege simpla. La aŭtoro havis

problemon. Multaj sciencaj vortoj estas jam internaciaj, sed malsimilas la esperantaj radikojn. Do ĉu uzi la tradician internacian vorton aŭ kunmeti esperantaj radikojn por havi veran esperantan vorton: ekzemple rompiĝo, terrompiĝo, aŭ faŭlto?

Dudich ĉefe uzas la jam internacian vorton, sed aldonas utilan geologian vortareton; tamen mi supozas, ke multaj legantoj bezonos ĝeneralan vortaron.

La teksto estas bone klarigita per utilaj diagramoj kaj simplaj sed klaraj desegnaĵoj de antikvaj vivoformoj. Sur nia kovrilo vidiĝas ekzemple la eterna konstruado kaj elfluado de tersurfaco ekde vulkano ĝis la marprofundo.

En la nuna stato de esperanta scienca eldonado, tia populara trarigardo (populara sed ankaŭ lerta) de ĉefaj sciencaj fakoj estas la plej bezonata donaco, kiun sciencistoj povas doni al la mondlingvo. Oni esperas, ke S.E.C. povos eldoni dum la lastaj jardekoj de la dudeka jarcento tutan panoramon de scienca lernado en tiu populara formo. En tiu entrepreno ĉiu sciencema esperantisto deziras, ke la Centro daŭrigu la sukceson komencitan per tiu ĉi libro.

Arnold Pitt

Facetoj de Rejna de Jong. Havebla ĉe la aŭtoro, Tomatenstraat 5; 2321 HC Leiden, Nederlando. Prezo 5 gld plus afrankostoj.

La titolo de ĉi tiu poemaro absolute taŭgas la enhavon. Dum mi legis la diversajn poemojn, mi trovis virinon, kies simpatio kaj zorgo pri nia ĉiutaga vivo tre forte montriĝas.

Sia vortprovizo kaj sperta uzado de la esperanta lingvo estas, laŭ mia opinio, senparalela, sed eĉ pli grave ni vidas virinon kies personeco per siaj poemoj, montras ĉiun homan emocion. Ŝi verkis pri la beleco de vivo en “Maja Tago”, kaj “Orludo”. Ofte ni vidas ŝin en pensema humoro pri la problemoj de la homaro – ekzemple – en “Muroj”, kie ŝi finfine demandas “Ĉu ni rajtas meti

homojn inter murojn?" Iomete langena-vanga ni trovas ŝin en "La regantoj". La poemo "Mi estas du" estas memanaliza sento. "Ĉu ankaŭ vi" estas simpla, kortuŝa poemo. Jen kelkaj humoroj kiujn vi trovos en ĉi tiu libro.

Se vi serĉas malmultekostan libron, kiu enhavas kaj bonan vortprovizon kaj bonan uzadon de la lingvo, mi konsilas al vi, ke via serĉado finiĝos sukcese se vi akiros ĉi tiun havindan libron Ĉu poezio plaĉas al vi aŭ ĉu vi estas iu kiu asertas, ke poezio ne interesas vin, tamen mi denove konsilas al vi aĉeti ekzempleron. Mi estas certa, ke ĉiuj kiuj legos ĉi tiun libron havos neforgeseblan, ĝuindan sperton.

Catherine E. Missen

Ombro Sur Interna Pejzaĝo de Spomenka Ŝtimec. Edistudio 1984. 141p. Jen la unua romano de aŭtoro kiu gajnas la vivrimedon per Esperanto. La libro aspektas bone kaj la presado plaĉas.

La enhavo temas pri ŝiaj pensoj kaj sentoj post la finiĝo de sesjara kunloĝado kun amanto. Ŝi brile kaj profunde esprimas la unuan malesperon je la disiĝo: '*Li ekmalĉeestas!*', '*Geaj litoj diskreskas kiam unu elloĝiĝas*'. Kaj iom amare montras la postan strebon pri daŭra normala vivado: '*Mi lernas ami por du tagoj kaj ne por jaroj*'. Kvankam la temo estas trista ĝi ne deprimas. En trafa kaj esprimoplena lingvo ŝi ekzamenas la pasintajn ses jarojn kaj enketas pri propra agado, propraj reagoj kaj motivoj: '*Mi klopodis lin savi de miaj kutimoj*'. Sur multaj paĝoj parolas tiu incita kaj instiga interna voĉo kiu ekzistas en ni ĉiuj: '*Via optimismo revenis! Do, oni amos denove? Vi ne haltos tie ĉi? – la voĉo konfete disĵetis gajajn demandojn al kiuj ĝi scias respondon*'.

Komencinte legi mi ne povis lasi la libron ĝis la fina paĝo, kaj pri tiu mi intencas diri nur, ke tiu fino estas realisma kaj ne senespera.

La verko-stilo estas kaj simpla kaj klera en la plej natura senco kaj la

metaforoj trafaj: '*Liaj vortoj kovris min kiel glacieroj*', 'Se vi aspiras pliboniĝon en la lingvo-uzado nepre legu ĉi tiun verkon de Spomenka Ŝtimec. Mi anticipas la venontan!

Manjoo Austin

Apenaŭ Bukedeto de Roger Bernard. Poemoj tradukitaj el la franca literaturo. 2a eldono. Iltis, Saarbrücken, 1984. 71p. Prezo £3.85 inkl. afr.

Multaj esperantaj literaturamantoj kontentiĝos ĉar oni povas denove aĉeti tiun ĉi bukedon ne tro etan.

Por tiuj, kiuj ne ankoraŭ konas ĝin, mi klarigu ke ĝi inkluzivis en 1971 kvindek "florojn", poeziaĵojn aŭ eltirajojn tradukitajn el konataj aŭtoroj francaj ek de la deksepa ĝis la nuna jarcentoj, kaj dek kvin "petalojn", poemetojn aŭ pecetojn. La du scenoj el la tragedioj *La Cido* kaj *Horaco* de Petro Corneille, pasioplenaj kaj ege deklameblaj, igas onin deziri ke la tradukinto plenumu la taskon esperantigi ambaŭ dramojn tutajn. La "Diservo por la Mortinta Infano", el Maria Noël, elvokas sincerajn larmojn.

Poeziaĵoj pli leĝeraj kaj ŝercaj ŝajnas multe taŭgi al la talento de Bernard, tiel kiel la "Stancoj al Markiza" de Corneille kaj la "Unua Rideto de l'Printempo" de Teofilo Gautier: "... Printemp', vi povas veni!" La "Sentimentala Dialogo" de Paŭlo Verlaine kaj la superreala "Rejna Kanto" de Vilhelmo Apollinaire tradukiĝas kun fideleco preskaŭ laŭlitera. Tamen, la oratorajo de la Cyrano de Rostand, kie la heroo ekfruzas "aldediĉi al financistoj versojn", parafraziĝas kun spritaj aludoj al la Esperantujo:

Nur ke ne montru sin malica

Al mi la Redaktoro de la *Revuo Nica!* Eĉ tiuj kiuj "ne ŝatas la poezion" ĝuos ĉi tiun satiron.

Ŝatintoj de la bukedetego jam plukita en 1971 ĝojos trovi dek tri aldonitajn tradukaĵojn kaj originalajn poeziaĵojn. Verve Bernard imitas francajn kanzonistojn, kies stilo parola kutime inkluzivas parodion:

Ne! mia amo plej ekstremas!

Ne, ne! mi estas tre sincera!

Jes . . . tiom pli ke ĉiam . . . la mono tre problems!

El tri kantoj nove esperantigitaj el Verlaine, Bernard tradukas la plej renoman, "Le ciel . . ." pli fidele ol Kalocsay, kvankam malpli fidele ol Waringhien. Rondelo imitas la stilon de la *Rimleteroj* de Marjorie Boulton kaj William Auld: "Ĉi tiuj teren min albatis . . ." Fine, listiĝas "Suferoj de Poeto":

Malvarmo kaj malriĉo, ignoro, miskompreno,

Kaj la maŝat' de l'societo . . .

Certe maŝato ne trafos Bernard.

Katelina Halo

Sur la bordo, de Nevil Shute. El la angla trad. K. G. Linton. Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1983. 254p.

Estante ŝatanto de Nevil Shute mi ĝoje eklegis ĉi tiun tradukon de unu el liaj plej memorindaj romanoj. Temas pri la konsekvencoj de nuklea milito, kiam la tuta loĝantaro de la Norda Hemisfero jam mortis pro nuklea radiado, kiu grade kaj neeviteble etendiĝas suden. La ejo de la romano estas la ĉirkaŭaĵo de Melbourne, en la plej suda parto de Aŭstralio (cetero la hejmo de la tradukinto), kaj Nevil Shute trafe komunikas al ni la vivon kaj sentojn de la lastaj vivantaj homoj sur la tero. Tiu temo, aktuala kiam li verkis ĝin (li mortis en 1960) bedaŭrinde estas eĉ pli aktuala nun, kiam tiom da landoj havas nuklean kapablon, kaj estas notinde, ke tiu fin-fina milito komenciĝis pro miskompreno, kiam malgranda lando bombis Usonon, per soveta aviadilo. Tial ĉi tiu romano, en sia nova internacia formo, povus atentigi la homojn de ĉiuj nacioj pri la nepra neceso de tutmonda interkonsento limigi – kaj prefere forigi – ĉiujn nukleajn armilojn.

La stilo de la originalo, aparte en la dialogo, devis esti tre malfacile tradukebla, kaj s-ro Linton sendube liveris al ni vivecan kaj atento-tenan tradukon, kiun legus kun intereso kaj plezuro la

plimulto de la esperantistoj, – des pli tiuj, kiuj ne konas la originalon, kies verva stilo iomete mankas en la traduko. Bedaŭrinde tiu suferas pro ŝajna manko de posta kontrolado, kiu povus esti evitinta multajn malgrandajn erarojn kaj plurajn anglismojn.

Mi legis la rakonton plejparte kun plezuro, malgraŭ la enuiga "skribmaŝina" tipografio, kaj nur kiam mi renkontis ion ne tute klaran aŭ "ne-Shute-ecan", mi rigardis la originalon, kie mi trovis, ke la tradukinto foje ellasis frazon aŭ frazeron, kaj foje eĉ enmetis! Entute, tamen, mi rekomendas ĉi aldonon al nia traduka literaturo. Ni tre bezonas multajn romanojn por la ĝenerala leganto – la beletristoj jam havas belan provizon – kaj Nevil Shute estas, laŭ mi, bona ekzemplo de verkisto por tia publiko. Sed mi devas ĉi komenton kiun mi memoras el recenzo de la originala romano, kiu diris, proksimume, "Mi tre esperas, ke Nevil Shute ne profetas tiel bone kiel li verkas!"

J. H. Sullivan

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj. Antaŭpagenda.

Entuziasmulo deziras brokantajn librojn en kaj pri la internacia lingvo. Bv sendi detalojn al Robert Aleksander, 18 Staveley Way, Knaphill, Woking, Surrey.

Mi estas studento de la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando), kaj mi deziras korespondi kun britaj esperantistoj. Rafal Frackowiak, Korczaka 10, 64-000 Kościan, Pollando.

NACI-PAC-KONSILANTARO, 29 Great James St., London WC1N 3ES. VOLAS HELPI VIN. Fondita en 1908, NPK estas ombrela organizaĵo por 180 pac-grupoj.

SOUTH PLACE ETHICAL SOCIETY, Red Lion Square, London WC1R 4RL. Lectures and discussions every Sunday 11 a.m. Publishes ETHICAL RECORD.

PRACTICAL ESPERANTO. 20 – 22 September 1985, Knuston Hall, Irchester, Wel-

lingborough, Northants. Tutors: Don Lord, Alan Nutton, Stephen Thomson. This lively course is growing in popularity each year – book early! Further information from the Principal.

Free introductory course: All tutors of the Course should send names and addresses of all students to Anny Lawson, E.A.B. Membership Recruitment Campaign, 22 Fortismere Avenue, LONDON, N10 3BL.

Press Panel: Please send all cuttings on Esperanto or the language problem *immediately* to Kate Millard, 18 Stirling Road, Bristolington, BRISTOL, BS4 3PD.

Local Representatives: If you wish to become a Local Representative of EAB, please contact Muriel Shackleton, 3 Northdale Mount, Bradford, West Yorkshire, BD5 9AP.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) celas eduki homojn *per* Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, ROMFORD, Essex, RM6 6EB.

Volas korespondi

Iraj Panahi Lakan, Engineer SHOKRI No 12, 41456 RASHT, Irano, 18-jara lernanto de la ekonomio, eklernis Esperanton antaŭ tri monatoj; pri arto, gazetoj, libroj, muziko, estetiko, elektroniko, filmoj. Volas ricevi gazetojn senpage.

Tibor TALNAI, knabo en la sesa klaso volas korespondi kun brita knabo, adreso:- Liszt F.u. 16, Győr, HUNGARIO.

F-ino Alica ZADUBANOVA, 19-jara studentino, volas korespondi kun junaj Britaj Esperantistoj por progresigi la scion pri la lingvo Esperanto. Adreso: SD Mladost C4 G2, Asmolovova 53, 84247 Bratislava, Ĉeĥoslovakio.

Stephen Attard, 12-jara knabo, St. Rita, Alley 2 Xghajra (?), Str. Zabbar, Malta volas korespondi kun geknaboj en Britujo pri ĉiuj temoj.

Juna Polo, 21-jara, laboristo volas korespondi kun iu juna Esperantisto en Britujo. Marek Bamberski, 42-300 UPT MYSZKOW, Pollando.

“La bahaa religio prezentas per si la instruojn de ĉiuj malnovaj religioj, koncernantajn individuojn, kaj al tio ĉi aldonas novajn instruojn, koncernantajn la socian kaj politikan vivon de la mondo”.

El “Bahaismo – la religio de paco”
de Lidja Zamenhof.

BAHAJ PRINCIPOJ INKLUZIVAS:

La unueco de la homaro
Sendependa esplorado de vero
Religio devas esti en akordo kun scienco
kaj racio
Egaleco inter geviroj
Universala edukado
Universala lingvo.